

# *Brazila* *Esperantisto*

OFICIALA ORGANO DE  
BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

---

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Respondeca redaktoro (redactor principal) s-ro Carlos Domingues

REDAKCIO — Praça 15 de Novembro, 101  
RIO DE JANEIRO — BRAZIL



*RIO DE JANEIRO, Avenuo Niemeyer*

# BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

(Liga Esperantista Brasileira)

B. L. E.

(Reconhecida de Utilidade Publica pelo Decreto  
n. 4356, de 26 de Outubro de 1921)

Unuiĝo Kreas Forton

## ESTRARO de B. L. E.

Honora prez. — D-ro Everardo Backheuser  
Hon. vic-prez. — D-ro Venancio da Silva  
Prezidanto — Ing. A. Couto Fernandes  
Vicprezidanto — D-ro Carlos Domingues  
Generala sek. — Ing. L. Porto Carreiro Neto  
1<sup>a</sup>. sek. — S-ro Odillo Pinto  
2<sup>a</sup>. sek. — F-ino Yrany Baggi de Araujo  
Kasisto — S-ro E. Felix Tribouillet

## GRUPOJ ALIĜINTAJ AL "B. L. E"

1. BRAZILA KLUBO "ESPERANTO". (1906) Sidejo: *Praça 15 de Novembro, 101, Rio de Janeiro.*
2. VIRINA KLUBO. (1912) Sidejo: *Praça 15 de Novembro 101, Rio de Janeiro.*
3. GRUPO ESPERANTISTA "COUTO FERNANDES". (1914). Sidejo: *Rua Collares Moreira, 116. S. Luiz do Maranhão.*
4. NOVA SAMIDEANARO. (1919). *Tristão Gonçalves, 55. Fortaleza. Ceará.*
5. ESPERANTISTA RONDETO "VERDA STELO". (1919). *São Bonifácio. Correio de Therezopolis, Sta. Catharina.*
6. VERDA STELARO. (1920). *Rua Marquez de Casias, 538. Pelotas. Rio Grande do Sul.*
7. SUD-BRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: *Rua dos Andradas, 1431. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.*
8. MONTARA ESPERANTO-KLUBO. (1927). *Grão Mogol, 197. Bello Horizonte. Minas Geraes.*
9. SERVIÇO DE ESTATISTICA GERAL DO ESTADO DE MINAS GERAES. (1929). *Secretaria da Agricultura. B. Horizonte. Minas Geraes.*
10. GIMNAZIA ESPERANTISTA RONDETO. (1929). Sidejo: *Gymnasio Catharinense. Florianopolis. S. Catharina.*
11. SAN-PAŬLA GRUPO ESPERANTISTA. (1930). Sidejo: *Rua Quirino de Andrade, 21 — 1.º São Paulo. Stato S. Paulo. Postkesto 2536.*

# ESPERANTA GAZETARO

FILATELISTA ADRESARO. Dumonata organo de poŝtmark-kolektantoj. Administracio kaj eldonejo en *Jabloune n. Orl., Ĉeĥoslovakujo*. Abono por 6 numeroj: 2 sv. frankoj.

LA ESPERO. Monata organo de *Hankoa Esperanto-Asocio*. Adreso: *P. O. Box 54. Hankow. Ĉinujo*.

ĤINA TELEGRAFISTO. (Antaŭe "Esperantista Telegrafisto". Monata aldono al la oficiala organo de "La Komuna Profitita Asocio de Telegrafaj Oficistoj", *Tientsin*. Red.: *Icio Sun, No. 804 A. Loh-An-Li, Kwenming Road, Shanghai. Ĉinujo*. Jarabono: 1 usona dolaro.

LABORISTA ESPERANTISTO. Organo de *Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj*. Red.: *F. Faulhaber, Marathonweg 86, Amsterdam-O. Nederlando*.

## INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN.

*Nova hejmo:* Wien I, Neue Burg (imperiestra kastelo).

*Malfermata:* Labortage 9—12, 15—18 h.: sabate 9—12 h.

*Ferioj:* 25-a de aŭgusto ĝis 5-a de septembro.

*Dumviva membreco:* Ĉiu samideano fariĝu dumviva membro de IEMW!

Li ricevos membrokarton kaj 2—3 diversajn fotografaĵojn de la nova hejmo de la Muzeo; ĉinjure la oficiale en Aŭstrio eldonotajn gvidfoliojn (ĉi-jare 2 novajn!); adrearon kun la adresoj de la membroj de Internacia Honora Komitato el la diversaj landoj, de Internacia Kuratora Komitato el la diversaj landoj, de la dumvivaj membroj kaj grupoj (aperonta 1931) kaj krome ĉinjure aldonon al la adresaro. Tion ricevos la Dumvivaj Membroj por nur sv. fk. 11. —

La saman ricevos la grupoj, asocioj, rondoj ktp. por la tempo de dek jaroj por la sama kotizo! Aliĝu!

Steiner, prez. kaj fond.

## ELEKTROTEKNIKA INSTITUTO

(Universitato de Grenoble, Francujo) eldonis varbfolion kun du ilustraĵoj. Ĝi estas senpage ricevebla de: *Comité de Patronage des Etudiants Etrangers, Place de Verdun, Grenoble*.

Tre interesa por eksterlandanoj, kiuj intencas studi en Francujo.

# BRAZILA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO  
de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

21 - a Jaro

Numero 7-9

Aligo al B. L. E. 5\$000  
Eksterlande Sv. fr. 4

Julio-Septembro 1930

REDAKCIO — Praça 15 Novembro, 101  
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

## CONGRESSOS UNIVERSAES DE ESPERANTO — CONGRESSO DE TURISMO

Tendo participado do 22º Congresso Universal de Esperanto, como delegado official do governo brasileiro, o dr. João Carlos Moniz, nosso consul em Londres, fixou as suas impressões em interessante artigo, publicado no "Oxford Mail".

Os conceitos emittidos nesse trabalho pelo culto e operoso diplomata assumem relevo extraordinario, dada a autoridade intellectual de quem os subscreeve, a espontaneidade que os dictou e a sinceridade de que se revestem.

O dr. Moniz não fizera nenhum estudo previo de Esperanto. Confessou lealmente que alimentava serias duvidas quanto á possibilidade de uma lingua artificialmente criada. A idéa de uma lingua composta por um só homem não lhe parecia sequer aceitavel.

O congresso foi-lhe, pois, uma revelação. São suas palavras: "Fiquei, assim, inteiramente, surpreendido quando pela primeira vez ouvi discursos em Esperanto e verifiquei que povos de muitas raças diferentes podiam usalo como efficiente meio de communicação."

Vale, sem duvida, a pena transcrever tambem a parte final do artigo:

"Uma outra funda impressão que colhi da conferencia foi a grande cordialidade que a lingua inspirava, e que se me afigurava

maior do que aquella que habitualmente prevalece nas reuniões internacionaes.

"Fiquei summamente impressionado com o espirito de fraternidade, que parecia quasi religioso, a dominar o Congresso de Esperanto.

"Parecia que, pelo facto de falarem numa lingua neutra, os que se achavam na conferencia tinham perdido uma parte de suas characteristics nacionaes, dirigindo-se uns aos outros antes como seres da mesma communidade humana do que como homens de raças diferentes.

"Esse aspecto se me revela importante, pois que indica que o Esperanto tornar-se-á um factor estimulante dos sentimentos de intensa solidariedade humana entre as raças."

Nestas mesmas columnas já tornei publica a minha profunda impressão diante de dois congressos universaes de Esperanto. Primeiro era Edinburgo e depois em Budapest, insulado pela minha lingua materna, pude avaliar nitidamente a gigantesca cooperação que, para o acceleramento do seu progresso, deve a humanidade esperar do uso generalizado do idioma neutro.

Arguido de suspeito que acaso eu fosse, por militar ha tanto tempo entre os esperantistas, de eiva igual não é licito tachar o depoimento do illustre representante brasileiro no Congresso de Oxford.

Por estar fortemente convencido de que os congressos universaes de Esperanto são irrespondiveis argumentos de ordem pratica,

*opostos a todas as inanes objecções que se façam á lingua auxiliar, por ter essa firme convicção é que acho necessaria a realização de um desses certames no Rio de Janeiro, tão depressa a idéa seja susceptivel de concretização.*

\*\*\*

*O que se fez no 3º Congresso Sul-Americano de Turismo, ha pouco encerrado nesta capital, relativamente ao Esperanto, marcará talvez o inicio de um movimento, cujo termino feliz venha a ser o certame universal esperantista que preconizo.*

*Approvando unanimemente as moções favoraveis ao Esperanto, que lhe foram apresentadas, o Congresso de Turismo proclamou a utilidade desse idioma para a propaganda dos paizes deste continente no largo terreno do turismo, assumpto de flagrante actualidade.*

*Dêem-se ao Esperanto os meios de prestar ao turismo os serviços de que é capaz, e o turismo auferirá com isso indeminutos proveitos.*

*Em troca, proporcionará o turismo a oportunidade de, um dia, aqui se congregarem não simples viajantes apressados, que fartos recursos pecuniarios impellem a correr mundo, pelo só prazer de correr mundo. Mas homens a quem preocupa, acima de tudo, o desejo de se aproximarem de seus semelhantes, pela mente e pelo coração, dispondo para tanto do maravilhoso instrumento de compreensão com que o genio de Zamenhof dotou a humanidade.*

C. D.

## TURISMO KAJ ESPERANTO

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

La 3-a Sudamerika Kongreso de Turismo, kunveninta en Rio de Janeiro dum la tagoj 8-17 de Septembro, aprobis unuanime la jenan deziresprimon:

“La 3-a Sudamerika Kongreso de Turismo rekomendas la publikigon en la helplingvo internacia Esperanto de la gvidlibroj kaj flugfolioj dissendotaj en la landojn ekster la Latinameriko kaj la instruadon de tiu lingvo en la publikaj lernejoj de ĉiu lando apartenanta al la Sudamerika Federacio de Turismo, tial ke ĝi estas la plej facila interkomprenilo inter la popoloj.”

La pronono estas subskribita de la jenaj kongresanoj: S-roj A. Couto Fernandes, Carlos Domingues, Guilherme Azambuja Neves, Teodoro Langgaard de Menezes, delegito de *Panamao*; Othon Leonardos, delegito de *Peruo*; João Monteiro Maciel, delegito de 1º Ministerio de Terkulturo; R. Dupuy de Lome Moreno, delegito de “Circulo de la Prensa” el Buenos Aires, kaj José Brandão Cavalcante, delegito de ŝtato Pernambuco. La raportinto, S-ro J. Ferreira Coelho, advokato kaj ĵurnalisto, faris tre favoran raporton.

Estas ankaŭ aprobita propono de S-ro Dionisio Ramos Monteiro, Ministro de *Urugvajo*, en Brazilo, kun aldono de S-ro Couto Fernandes, pri la verkado de sintezaj libretoj pri geografio, historio kaj ekonomio de ĉiuj sudamerikaj landoj eldonotaj en diversaj lingvoj, inkluzive en Esperanto.

## UNUA PAROLANTA FILMO EN ESPERANTO

Kiel ni anoncis en nia lasta numero, dank’ al ĝentileco de S-ro Tibor Rombauer, administranto de “Paramount” en Brazilo, estas prezentita en “Cinema Capitolio”, dum la tagoj 30a Junio kaj 1a Julio, la unua parolanta filmo en Esperanto.

Tamen pro multaj petoj faritaj al la administracio la filmo restis en la programo dum la tuta semajno. Tio estis bona propagando por Esperanto.

La grupoj de S. Paulo, Bello Horizonte, Porto Alegre kaj Florianopolis petis la prezentanton de “Paramount” ke li permesu la prezentadon de tiu filmeto en iliaj urboj.

“Jornal do Commercio” kaj “Correio da

Manhã", el *Rio de Janeiro*, publikigis dum la tuta semajno anoncon de la filmentrepreno.

"O Jornal" publikigis artikolon pri la intervjuo kun S-ro C. Laemle aperinta en "Herald de Esperanto" kaj aperigis lian portreton kaj tiun de S-ro J. Scherer. Dum la tria laborkunsido de la Oxford' a Kongreso S-ro Hetzel, prezidento de Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, deklaris "ke la kompanio estas ĝis nun tute kontenta pri la rezulto de la unua filmo. Paramount baldaŭ fabrikos aliajn parolfilmojn en Esperanto."

## ESPERANTO ĈE LA PUBLIKA INSTRUADO

Brazila Ligo Esperantista eksciinte pri la kreado de la "Interŝtata kaj Internacia Lerneja Interŝanĝo-Servo" ĉe la publikaj lernejoj en Rio de Janeiro tuj proponis sian helpon al S-ro Direktoro de la Publika Instruado, D-ro Fernando de Azevedo, por la tradukado de la korespondaĵoj ricevitaj kaj sendotaj en Esperanto.

Dankante tiun proponon skribis al Brazila Ligo Esperantista S-ro D-ro Jonathas Serrano, Teknika Subdirektoro de tiu Departamento, kaj ĝin sendis la unuan numeron de la oficiala "Bulteno de Publika Edukado", kiu publikigis artikolon de Prof. D-ro Everardo Backheuser tradukitan el la "Internacia Pedagogia Revuo". Sur la koverto de tiu ĉi bulteno oni legas skribaĵojn en kvar naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

Sekve de tiu kontentiga akcepto B. L. E. dissendis cirkuleron, kiu enhavas kelkajn plej interesajn punktojn de la dekreto kreinta tiun Servon, al la gravaj revuoj kaj gazetoj, naciaj societoj kaj delegitoj de U. E. A.

La EDUKA KONSILANTARO, ĉe kunsido prezidita de D-ro Fernando de Azevedo, ordonis la transskribon de la cirkulero de B. L. E., en Esperanto kaj portugale. Kun la celo danki tiun helpon S-roj Couto Fernandes kaj Carlos Domingues, estraranoj de B. L. E., vizitis D-ron Jonathas Serrano. Tiam ili plejplezure konstatis ke li bone scihavas Esperanton kaj jam de multaj jaroj tre interese akompanas ĝian progreson. D-ro J. Serrano interparoladis kun la estraranoj de B. L. E. pri la rimedoj akceli la propagandon de Esperanto ĉe la instruistara rondo kaj promesis sian helpon tiucele.

Post kelkaj tagoj aperis en la oficiala organo "Jornal do Brasil", la jena oficiala sciigo de la Teknika Subdirektoro pri la propono de B. L. E. kaj ĝia akcepto de la Direktoro de la Publika Instruado:

*"S-roj inspektoroj lernejoj, direktoroj kaj instruistoj*

Mi sciigas vin ke BRAZILA LIGO ESPERANTISTA proponis traduki en la internacian lingvon Esperanto leterojn, poŝtkartojn aŭ alian korespondadon, kiujn, laŭ la lerneja interŝanĝado, la lernantoj deziros sendi eksterlanden, speciale al la landoj, kies lingvoj estas malpli konataj ĉe ni (Rusujo, Persujo, Ĥinujo, Japanujo, Germanujo, Aŭstrujo, baltaj kaj skandinavaj landoj, kc.). Ĝi estas ankaŭ preta traduki portugalen la tie ĉi ricevitajn esperantan korespondadon. En sia sidejo (Placo 15 de Novembro 101, 2<sup>a</sup> etaĝo), BRAZILA LIGO ESPERANTISTA donos al la interesuloj ĉiujn klarigojn. Distrikto Federala, 12-an de Marto 1930. (s) *Jonathas Serrano*. Teknika Subdirektoro".

B. L. E. sendis similan cirkuleron al ĉiuj lernejoj ĝeinspektoroj kaj ĝedirektoroj de ĉiuj publikaj lernejoj.

Laŭ propono de D-ro Paulo Maranhão, lerneja inspektoro, tuj aprobita de la Teknika Subdirektoro, malfermiĝis la jenaj kursoj de Esperanto por ĝeinstruistoj:

*Lernejo Barth* — Prof. D-ro Carlos Domingues.

*Lernejo Rodrigues Alves* — Prof. Ing. A. Couto Fernandes.

*Lernejo Colombia* — Prof. F-ino Esther Bloomfield.

*Sidejo de B. L. E.* — Prof. D-ro Luiz Porto Carreiro Neto.

Baldaŭ malfermiĝos aliaj kursoj.

Antaŭ la malfermo de tiuj ĉi kursoj faris interesan propagandan paroladon, ĉe la vasta salono de la Geografia Societo, la universitata profesoro D-ro E. Backheuser. Post la parolado, kiun ĉeestis multaj ĝeinstruistoj, S-ino Maria L. Bocayuva Jaguaribe de Mattos, profesorino aprobita, deklamis la belan soneton "Tiu, kiu ne forpasas", de D-ro Jonathas Serrano, esperanten tradukitan de D-ro Porto Carreiro Neto.


La parolado kaj la kursoj estas anoncigitaj al ĉiuj ĝeinstruistoj per cirkulero de la Teknika Subdirektoro publikigita en la oficiala gazeto. Jam funkcias regule ĉiusabate la Komisiono elektita de la Direktoro de la Publika Instruado

por direkti la Servon de la Lerneja Interŝanĝado. Prezidis tiun Komisionon, konsistantan el ses membroj, inter kiuj troviĝas S-ino Maria L. Bocayuva J. de Mattos, la Teknika Subdirektoro.

Ĉeestas la kunvenon, kiel delegito de B. L. E., D-ro Carlos Domingues, elektita de ĝia prezidanto, kiu por tio ricevis afablan inviton de D-ro Jonathas Serrano.

La Komisiono jam ricevis kaj sendis korespondaĵojn en Esperanto.

La dua numero de la "Bulteno de Publika Edukado" publikigis la cirkuleron de B. L. E., en Esperanto kaj en portugala lingvo, kaj ankaŭ la korespondaĵojn inter la estraroj de B. L. E. kaj de la Publika Instruado.



## NESUSPEKTINDAJ IMPRESOJ

La brazila registaro elektis S-ron João Carlos Moniz, nian konsulon en Londono, por ĝin reprezenti ĉe la 22-a Universala Kongreso de Esperanto, ĵus okazinta en Oxford. S-ro Moniz, kiu ankoraŭ ne estis havinta okazon eklerni Esperanton, tamen faris en tiu ĉi lingvo sian saluton al la kongreso. La ĵurnalo "Oxford Mail" publikigis liajn impresojn pri tiu universala kunveno. Li komenciĝis per la jenaj vortoj: "Mi havas la honoron reprezenti la brazilan registaron ĉe la 22-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Oxford, kaj mi ricevis grandan intelektan stimolon el interparoladoj kun kongresanoj kaj el la kunsidaj diskutoj.

Mi devas konfesi ke antaŭ mia veno al Oxford mi havis gravajn dubojn pri la ebleco de artefarita internacia lingvo.

Same kiel multaj klasikaj filologoj, mi ĉiam opiniis ke iu lingvo estas spontanea kaj anonima kreaĵo de la homaro kaj ke ĝi nur akiros flekseblecon kaj kapablecon esprimi la plej belajn nuancojn de l' penso tra centjaroj da evoluo. La ideo pri lingvo kreita de unu sola menso el la elementoj de grupo de lingvoj kaj submetita al rigidaj procedoj logikaj ŝajnis mia opinie tute nekredbla aŭ neebla. Tial mi tute surpriziĝis, kiam la unuan fojon mi aŭdis paroladojn en Esperanto kaj konstatis ke trediversnaciaj popoloj povas ĝin uzi kiel efikan interkomunikilon".


Kaj li finiĝis jene: "Alia de mi kaptita profunda impresoj el la kongreso estis la granda koreco, kiun la lingvo estas kapabla inspi-

kaj kiu ŝajnis al mi pli granda ol tiu kiu ordinare regas ĉe internaciaj kunvenoj. Mi treege impresiĝis je la frateca spirito, ŝajnanta preskaŭ religia, kiu superregis la kongreson de Esperanto.

Ŝajnis ke, pro tio ke ili parolas neŭtralan lingvon, la ĉeestantoj perdas parton de siaj naciaj karakterizaj ecoj, sin direktante unu al la aliaj kiel estuloj de la sama kunfrataro ol kiel diversnaciaj homoj. Tiu aspekto ŝajnas al mi tre grava, ĉar ĝi elmontras ke Esperanto povas fariĝi stimulan faktoron de la sentoj de forta homa solidareco inter la rasoj."

Grandan plezuron faris al la estraro de Brazila Ligo Esperantista la legado de tiuj nesuspektindaj impresoj tre favoraj al Esperanto.

La Prezidanto de B. L. E. sendis dankan telegramon al S-ro João Carlos Moniz. La gravaj ĵurnaloj "Jornal do Commercio", "Jornal do Brasil", "O Paiz" kaj "O Globo" publikigis la tradukon de liaj impresoj kaj "Radio Sociedade Mayrink Veiga" ĝin disradiis.



## ESPEROJ DE ESPERANTO

La grava ĵurnalo "O Paiz", en sia numero de 31 de Aŭgusto, publikigis tre interesan artikolon sub la titolo "Esperoj de Esperanto". Ĝi komenciĝis per la jenaj vortoj: "Malsukcesis la nigrevidemaj antaŭdiroj kaj la malkuraĝigaj ironioj, kiuj akceptis ĉe la sciencaj kaj literaturaj rondoj, respektive, la pretendojn de la artefarita lingvo kreita de Zamenhof fariĝi la ilo de la teorie de longe dezirita spirita interkomuniko inter ĉiuj popoloj.

Parolinte pri la sukceso de la lasta Universala Kongreso ĝi finiĝis jene:

"Tiel granda persistemo kaj tiel evidenta disradiado permesas la kredon, ke la mondo fine akceptos tiun grandvaloran elementon tute nediskutinda — por la mensa interŝanĝo de ĉiuj popoloj."

La prezidanto de "Brazila Klubo Esperanto" skribis al la redakcio de tiu ĵurnalo dankan leteron per kiu li rememoras ke la unua kurso de Esperanto en Brazilo estas farita per la kolonoj de "O Paiz", kiu estis ankaŭ la nuna sidejo de tiu klubo. Tiun leteron publikigis la ĵurnalo.

## TRI KONTINENTOJ

Antaŭ ol sia foriro al Eŭropo S-ro Berger Bertalan, hungaro, akompanata de S-roj Ernest Van Steen, belgo; H. Jutaka Kikuĉi,



S-roj Bertalan, Couto Fernandes, Van Steen kaj Kikuĉi.

japano; kaj Maltez Fernandes, brazilo, faris viziton al S-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de B. L. E.

Post amika interparolado S-ro Couto Fernandes ilin regalis per taso da ĉampano. Dirinte kelkajn vortojn pri la interna ideo de Esperanto li tostis je ilia sano. S-ro E. Van Steen dankis kaj salutis la edzinon de S-ro Couto Fernandes.

## BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

Jen estas la nova estraro de "Brazila Klubo Esperanto", kiu ĝin direktos ĝis la 30a de Junio 1931: Prez., D-ro Carlos Domingues; vicprez., D-ro Luiz Porto Carreiro Neto; unua sek., F-ino Esther Bloomfield; dua sek., F-ino Yrany Baggi de Araujo; unua kas., S-ro Ismael Gemes Braga; dua kas., S-ro Ernesto Araujo Familiar. Konsilantoj: S-ino Maria

Luiza Bocayuva Jaguaribe de Mattos, D-roj Venancio da Silva kaj J. B. de Mello e Souza, generalo J. Silveira Sobrinho, inĝenieroj H. Motta Mendes kaj Theobaldo Recife, S-roj E. Felix Tribouillet, Odillo Pinto kaj Maltez Fernandes.

## LA REVENO

Mi revenis. La dom' estas silenta...  
Kvieta ĉio... Ŝajnas paradizo...  
Kiel ĉarme! La floroj, la serpenta  
Rivereto, la kampoj el maizo...

Salutas min ĉe l' pordo la mestizo.  
Kun ĉapel' en la man', kun jaro centa  
Sur la dorso... Eniras mi. Momenta  
Bato de l' kor'... Por ŝi estos surprizo...

Jen mi revenis... Kie, plej amata,  
Vi, mia tuta vivo, delikata  
Rozo, de ĉiuj floroj la reĝin'?

Vana traserĉo! Vana restas krio  
Al la surda Transmondo! Nun, por kio  
Tuta ĝarden', se mi ne havas vin?...

29.7.30

*Porto Carreiro Neto*

## TIU, KIU NE FORPASAS

(Jonathas Serrano)

L' oro min blindallogis. Fine sata  
Mi kredis, ke per ĝi estos la koro.  
Kun ĝi alvenis nur nova doloro:  
Ĝia tuŝ' estis fajro senkompata.

Al ripozo sopiris mi de l' gloro.  
Nokto sendorma tiu — ne l' revata  
Plezur'! Sufer' kaj tim' centobligata,  
Jen la dono de l' famo kaj furoro!

Kaj ĉio, ŝajne firma rokgranito,  
Vidante tiam, ke sin disfrakasas:  
Iluzio, plezuroj, oro, fam',

La voĉon aŭdis mi de l' Krucumito:  
— Amu min: Min ja sola ne forpasas,  
Mi estas la Pardon', Mi estas Am'!

16.4.30.

El la portugala lingvo tradukis

*Porto Carreiro Neto*  
(El "Espero Katolika")

## 22º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Realizou-se em Oxford, de 2 a 9 de Agosto, sob o patrocínio de S.A. o Duque de Connaught, do "Mayor" de Oxford, dos Ministros do Exterior, do Interior e da Educação e de outras altas autoridades inglesas, o 22º Congresso Universal de Esperanto, com a participação de 1.211 esperantistas de mais de 30 paizes.

Varios governos se fizeram representar officialmente.

Pelo Brasil saudou o Congresso, em Esperanto, o Dr. João Carlos Moniz, nosso consul em Londres.

Em nome da Austria falou, em allemão, o Dr. Engel e, em nome da Allemanha, o Dr. Deisman.

O Professor Mihálik representou o governo hungaro e fez, em Esperanto, a communicacão de que o Ministro do Culto da Hungria quer introduzir o Esperanto nas escolas, se outros Estados estiverem promptos a fazer o mesmo.

Pelo Liechtenstein falou, no idioma internacional, o Sr. Kreuz que disse ter esse paiz publicado agora mesmo uma série de cartões postaes officiaes com o texto em Esperanto.

Representou a Hollanda o Sr. Isbrucker que, em Esperanto, narrou o exito que tiveram no seu paiz os cursos da lingua neutra, organizados para os professores hollandezes e dirigidos pelo Padre Chê.

A Noruega foi representada pelo Capitão Bugge Paulsen que chamou a attencão para o facto de ser essa a quinta vez que o governo norueguez seguidamente envia delegado aos Congressos Universaes de Esperanto, tendo-se formado, assim, quasi uma tradiçãõ.

Como delegado do Estado americano de Pensylvania falou o Sr. Hetzel e pela Polonia o Professor Bujwid, dizendo que o governo polonez está prompto a introduzir o Esperanto nas escolas.

A Rumania delegou o Sr. Constantinescu, que saudou o Congresso em francez.

Pelo Estado australiano de Victoria, falou o Sr. Pyke.

A saudação pronunciada em francez e as duas em allemão foram interpretadas pelo secretario geral do Congresso, que as traduziu para o Esperanto.

Foi eleito presidente do Congresso o Sr. B. Long.

Fizeram-se representar no Congresso diversas associações, entre as quaes a Sociedade de Geographia do Rio de Janeiro e o Club de Engenharia, tendo a Brazila Ligo Esperantista enviado, em Esperanto, um telegramma de saudações.

O "Mayor" de Oxford offereceu brilhante recepção aos congressistas.

Varios professores fizeram conferencias em Esperanto no decurso do Congresso, organizando-se, assim, uma como Universidade Internacional, que obedeceu ao thema geral — Lingua e Vida. Preleccionaram: o prof. Th. Cart, da Escola das Sciencias Politicas de Paris, sobre "A evoluçãõ das linguas"; o Dr. Collinson, da Universidade de Liverpool, sobre "A internacionalidade do vocabulario de uma lingua artificial, sua utilidade e seus limites"; o Dr. B. Mgliorini, da Universidade de Roma, sobre "Os elementos do vocabulario europeu"; o Dr. Kalocay, de Budapest, sobre "A evoluçãõ da lingua poetica Esperanto: o prof. P. Bannemann, de

Leipzig, sobre "Mozart desconhecido" (com audições musicaes).

Um dos numeros de diversões do Congresso foi a representaçãõ, em Esperanto, da conhecida comedia "A tia de Carlitos", que, em razãõ da grande affluencia de congressistas, teve que ser levada á scena por tres vezes. Tomaram parte na representaçãõ esperantistas de seis paizes diversos (Inglaterra, França, Allemanha, Hungria, Hespanha e Polonia). O principal papel coube ao Sr. A. Starke, conhecido actor allemão.

Houve diversas excursões, concertos, exhibições de dansas nacionaes e um grande baile, no qual muitos esperantistas se apresentaram em seus trajos nacionaes.

Effectuaram-se officios religiosos em templos catholicos, protestantes e judeus, com sermões pregados em Esperanto.

Realizaram-se, igualmente, reuniões de medicos, juristas, engenheiros, jornalistas, professores, etc., promovidas pelas respectivas associações de classe, de caracter internacional.

Foi approvada uma moçãõ a ser enviada a todos os governos sobre a introduçãõ do Esperanto nas escolas.

Compareceram ao Congresso diversos membros da familia Zamenhof tendo o Dr. Felix feito um esplendido discurso na sessãõ de encerramento.

Foi escolhida a cidade de Cracovia para séde do 23º Congresso.

## ARGENTINA MOVADO

### INTELEKTULOJ SIN INTERESAS POR ESPERANTO

Ĝis nun la intelektuloj el nia lando malmulte interesiĝis por nia afero, eĉ kelkaj konsideris ĝin kiel banalan kuriozaĵon, Tamen dum lasta tempo ni rimarkas kontraŭan pensmanieron. Ĉefe la junaj intelektuloj ne nur scivolos, kio estas Esperanto, sed iuj lernas la lingvon. Inter la lernantoj de la privataj kursoj, kiuj gvidas la samideanoj: S-ro Andrés Villafranca kaj D-ro. Miguel H. Catalano, ni notis sinjorojn Alvaro Yunque kaj Xavier Bóveda, ambaŭ konataj verkistoj, kiuj kunlaboras en la ĉefaj gazetoj de nia lando. Ili montris al ni sian emon por Esperanto, kaj promesis post la fino de la kurso sin okupi pri propagando en kleraj rondoĵoj. S-ro Bóveda ankoraŭ aldonis ke li tre deziras verki Esperantlingve.

### ESPERANTO EN GAZETARO

Pere de S-ro Alvaro Yunque ni celis ke la literatura revuo "CLARIDAD" (Klareco) sin okupas pri Esperanto. De Majo de la nuna jaro en tiu ĉi gazeto aperas regule artikolojn



pri Esperanto kaj kronikojn pri Movado tutmondajn.

Ankaŭ la tagjurnalo "LA PROTESTA" (La Protesto) publikigas regule Esperantajn tradukaĵojn pri proletariaj revoluciemaj aferoj.

La vespera ĵurnalo "ULTIMA HORA" (Lasta Horo) intencas aperigi specialan literaturan paĝon, en kiu ĝi metos ankaŭ Esp. propagandon.

## PUBLIKAJ KURSOJ POR LA NUNA JARO

Krom la du privataj menciitaj, nia societo preparis naŭ publikajn kursojn, kiuj estos klarigataj ĉe diversaj kvartaloj de nia urbo. La funkciado de la kursoj komenciĝos post la Julia duonmonato.

*Argentina Esperanto Asocio*

## BRAZILA KRONIKO

MARANHÃO — *S. Luiz* — La profesoraro de la Komerca Akademio, honore de sia mortinta membro S-ro Domingos Perdigão, decidis unuanime ke la kurso de Esperanto restos en ĝia programo. Tial oni elektis por ĝin direkti f-inon Euridice Miranda, kiu lernis Esperanton en tiu Akademio.

Laŭ peto de S-ro Fernando Perdigão, D-ro Edmundo Fernandes, direktoro-prezidanto de la Akademio, cedis unu el ĝiaj salonoj por la sidejo de *Grupo Esperantista Couto Fernandes*, kiu certe baldaŭ rekomencos vigle la propagandon de Esperanto.

S. PAULO — *S. Paulo* — "Diario da Noite" publikigis artikolon kaj reproduktis la kapon de "Heroldo de Esperanto" n° 16 (564).

SANTA CATHARINA — *Florianopolis* — Aliĝis al B. L. E. "Gimnazia Esperantista Rondeto", fondita la 1an de Majo 1929 ĉe *Gymnasio Catharinense*. Jen ĝia estraro: Honora prez., Pastro Luiz Gonzaga Froener; prez. kaj unua sek., S-ro Egon Schaden; vic-prez. kaj dua sek., S-ro José Bonifácio Schmitz.

Foriris al *Rio de Janeiro* S-ro Paulo de Almeida Machado, unu el la fondintoj de tiu rondeto.

RIO GRANDE DO SUL — *Porto Alegre* — Dum sia kelktaga restado en Rio de Janeiro, S-ro Viterbo de Carvalho vizitis la sidejon de B. L. E. kaj interparoladis kun ĝia estraro pri la rimedoj akceli la propagandon de Es-

peranto en tiu Suda Ŝtato. Reveninte al P. Alegre li tuj malfermis kurson.

Li ankaŭ iniciatis propagandon de la help-lingvo inter la ekleziuloj kaj skribis al la Pastro G. Ramboux, ĉefredaktoro de "Espero Katolika", al li sendante liston de la tuta pastraro en la ĉefurbo. "Correio do Povo" publikigis sciigojn pri la progresoj de Esperanto.

*Rio Grande* — Aliĝis al B. L. E. S-ro S. Goussinki.

MINAS GERAES — *Bello Horizonte* — El letero al ni sendita de S-ro João Vianna ni elĉerpis la jenon:

"Ni sciigas al vi ke, laŭ iniciato de S-anoj Aldemar de Andrade Camara kaj Geraldo Padua, fondiĝis antaŭ 3 semajnoj (4 Junio) la *Junulara Esperantista Societo*, al kiu apartenas nur junuloj de Gimnazioj Ŝtata kaj Arnaldo, ktp. Ĝi jam havas ĉirkaŭ 25 anojn, kaj malfermis kurson, kiu funkcias ĉiusemajne vendrede. Ĝiaj kunsidoj estas ĉiulundaj kaj ĝia sidejo estas ĉe nia salono mem (Av. Paraopeba, 104,) cedita de S-ro Prof. Tito Novaes, nia bonfarinta ano, kaj direktoro de *Faculdade do Comercio de Minas Geraes*, kie Prof. Backheuser faris sian paroladon pri Esperanto, en monato Majo lasta." Pri tio ni jam ricevis leteron de S-ro Geraldo Padua, ano de B. L. E. kaj unu el la fondintoj de tiu societo. Ni esperas ke ĝi aliĝos al nia Ligo.

*Malacacheta*. El tiu nordŝtata vilaĝo ni ricevis tre interesan leteron de nia fervora samideano S-ro Ismael Gomes Braga, kiu nun faras komercan vojaĝon. Li babilas pri la "atenduloj", t. e. personoj, kiu sin dirante amikoj de lingvo internacia, tute ne lernas Esperanton atendante ke la ceteraj ĝin lernu por ke ili faru la samon. Bedaŭrinde la nombro de tiaj individuoj estas tre granda. S-ro Ismael Braga estas tre vanta pro la esperantigo de D-ro Gerson de Almeida, kuracisto, kiu lernis Esperanton en malmultaj tagoj.

*Theophilo Ottoni* — Ankaŭ en tiu ĉi urbo S-ro Ismael Gomes Braga propagandis nian lingvon. Ĉar tie oni aŭdis la sciigon pri la deziresprimoj aprobitaj de la Tria Sudamerika Kongreso de Turisino disradiitan en Rio de Janeiro de "Sociedade Mayrink Veiga", aperis en la semajna gazeto "O Mucury" longa artikolo pri Esperanto kun informoj pri ĝiaj progresoj.

*Rio de Janeiro* — Funkcias regule kursoj de Esperanto por instruistinoj de la publikaj lernejoj en la jenaj sidejoj: Lernejo Colom-

bia, Lernejo Rodrigues Alves, Lernejo Barth kaj Brazila Ligo Esperantista, respektive sub la gvidado de la jenaj profesoroj aprobitaj: F-ino Esther Bloomfield, S-roj Couto Fernandes, Carlos Domingues kaj Luiz Porto Carreiro Neto. F-ino Esther Bloomfield direktas alian kurson ĉe la sidejo de Brazila Klubo "Esperanto."

— La admiralo Paim Pamplona, profesoro de Geografio ĉe Milita Kolegio kaj direktoro de la tre konata "Collegio Nacional", dum unu el siaj prelegoj elmontris al siaj lernantoj la neceson de la alpreno de la helplingvo Esperanto, kiel la sola ebla solvo por la problemo de interkompreno inter la popoloj.

— S-ro Sá Leitão skribis per la kolonoj de "Jornal do Brasil" artikolon titolitan "Anakronisma decido" pri la deklaro de la *Brazila Literatura Akademio*, ke nur la viroj povas fariĝi ĝia ano. Tamen, kiel Pilatos en la Kredo, aperis en ĝi la frazo: "kiu rememoras la senspritecon de Esperanto". F-ino Esther Bloomfield, en la nomo de "Virina Klubo", tuj skribis al S-ro Leitão kaj sendis al li diversajn esperantaĵojn por ke li povu koni la aferon pri kiu li diris malspritaĵon.

— D-ro Saladino de Gusmão, kiu reprezentis la Societon de Geografio ĉe la Tria Sudamerika Kongreso de Turismo, estas elektita raportanto ĉe unu el ĝiaj komisionoj. Tial li raportis pri la jena propono: "Ĉu la kreado de internacia mono estas ebla?" En sia longa raporto li citis la opiniojn de S-ro René de Saussure, elpensinto de "Spesnilo", kaj de Ĉefeĉ, fondinto de "Ĉekbanko Esperantisto". Dum unu el la kunsidoj de la Konsilantaro de la Societo de Geografio D-ro Saladino de Gusmão legis sian raporton, kiu faris bonan impreson. D-ro E. Backheuser profitis la okajon por paroli pri Esperanto.

— S-ro Paulo de Almeida Machado, unu el la fondintoj de "Gimnazia Esperantista Rondeto", el Florianopolis, translokiĝis al Rio de Janeiro, kiel lernanto de "Gymnasio S. José". Tie li malfermis kurson de Esperanto kaj esperas fondi tre baldaŭ klubeton, kiu eble ricevos la nomon *Brazila Esperantista Katolika Junulara Asocio*.

— "Agencia Americana", tre grava telegrafa agentejo, kies direktoroj estas la fratoj Carvalho Azevedo, daŭrigas montri sian simpatian al Esperanto. Ĝi dissendis al la ĵurnaloj telegramojn pri la Universala Kongreso kaj disradiis sciigojn pri la Tria Sudamerika Kongreso de Turismo. Krom tio, ĝi sendas

al la prezidanto de B. L. E. pecetojn de ĵurnaloj publikigintaj informojn pri Esperanto.

— La gravaj societoj "Radio Club do Brasil" kaj "Radio Sociedade Mayrink Veiga" disradiis sciigojn pri Esperanto.

— Preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj parolis pri Esperanto dum la monatoj Julio, Aŭgusto kaj Septembro. Ni citas la jenajn: "Jornal do Commercio", "O Globo", "Correio da Manhã", "Jornal do Brasil", "Diario da Noite", "A Noite", "A Patria", "A Batalha", "A Cruz".

## NO ESTRANGEIRO

### O ESPERANTO NA INSTRUÇÃO

Em Southend-on-Sea, Inglaterra, foi resolvido ha pouco tempo incluir o Esperanto no curso do Instituto Technico Nocturno. Todos os cursos desse instituto estão subordinados á Directoria de Educação daquella cidade; isto significa que elles são oficialmente approvados e sancionados.

Em Nagashima-tcho. Japão, o Lyceu Feminino adoptou o Esperanto em vez do inglez. ha dous annos, com enorme successo. Ultimamente as alumnas fizeram uma grande manifestação publica por meio de cantos, declamações e dialogos.

O inspector escolar do districto de B. Leipa, na Tcheco-Slovaquia, Sr. R. Fleischer, resolveu autorizar o ensino da lingua auxiliar Esperanto como materia obrigatoria nas quartas classes das escolas burguezas de Haida.

Esta cidade é o centro da famosa industria bohemia de vidro e tem um trafico intenso com todas as nações do mundo. Já ha muitos annos vem sendo nesse districto ensinada a lingua franceza, mas quasi nenhum resultado pratico tem sido notado.

O ensino do Esperanto será ministrado tres vezes por semana, devendo ser os exames finaes presidiados pelas respectivas directoras.

Se os resultados desse ensino forem, como se espera, satisfactorios, nas escolas burguezas de todo o districto será o ensino da lingua franceza substituido pelo do Esperanto, idioma muito mais facil e mais logico.

### O ESPERANTO NO TURISMO

A 27 e 28 de Julho p.p. realizou-se em Stockolmo, Suecia, o 1.º Congresso do Comité Esperantista de Turismo, do qual participaram 80 suecos, 24 estonianos, 7 lithuanios, além de inglezes, allemães e individuos de outras nacionalidades. Entre a Estonia e a Suecia ha um serviço regular de turismo, e entre esses turistas só se fala o Esperanto.

### O ESPERANTO NOS CONGRESSOS

Durante o Congresso de Deões, Reitores e Educadores, para a cooperação intellectual inter-americana, realizado recentemente em Cuba, o delegado official argentino, Dr. Luciano R. Catalano, apresentou uma proposta para a adopção e emprego do Es-

peranto como lingua auxiliar na correspondencia internacional do "Instituto Interamericano para a Co-operação Intellectual", organização criada por decisão daquelle Congresso. A proposta foi unanimemente approvada.

O "Diario de la Marina", jornal de Havana, refere que o Dr. Catalano recebeu congratulações de muitos delegados, especialmente latino-americanos, pela sua iniciativa e immediata acceitação.

#### UMA ORGANIZAÇÃO JAPONESA

Um dos movimentos sociaes proeminentes no Japão é *Kiboša*, ou a Sociedade da Esperança. É uma sociedade para a disseminação da educação e cultura, e tem mais de um milhão de membros. Recentemente resolveu publicar uma revista em esperanto e o primeiro numero desta acaba de sahir a lume. Está lindamente impresso em esperanto e japonéz, em papel artistico e custa 2 chelins a sua assinatura annual. (Podem ser obtidos numeros avulsos, com um coupon internacional de resposta, da Eldonejo Kiboša, 458 Niŝiookube, Tokio). É mais uma prova da extraordinaria divulgação do Esperanto no Extremo Oriente.

#### O PRESIDENTE DA TCHECOSLOVAQUIA

Este anno a Tchecoslovaquia celebrou o octogésimo anniversario do seu presidente e heróe nacional T. G. Masarik, o homem que acima de todos os mais tem concorrido para o renascimento de sua nação. Os esperantistas se uniram aos Tchecoslovaquios nas suas congratulações, pois o presidente Masarik, tem, em mais de uma occasião, favorecido o Esperanto (como tambem o seu principal correligionario, Dr. Benesch). O Ministerio do Exterior da Tchecoslovaquia adopta methodos muito modernos, pois que delle recebemos uma noticia official das commemorações em Esperanto.

#### MONDVOJAÇO POR ESPERANTO!

S-ro Jos. R. Scherer el Los Angeles, speciala delegito de I. C. K., ekvojaços la lan de Setembro 1930 por granda propaganda vojaço. Gi konsistos el du partoj.

La preparo por la Ekstrema Oriente estas jam farita. La postan parton ni preparos tuj.

La prospekto enhavas la proksimumajn datojn, kiam s-ro Scherer atingos nian kontinenton, same la lokojn, kiujn li vizitos laŭ la ĝisnuna plano.

1a Parto: Ekstrema Oriente.

2a Parto:

Egiptujo — 15. Marto 1931

Palestino — 1. Aprilo 1931

Istanbul — 15. Aprilo 1931

Athenai — 25. Aprilo 1931

Palermo-Messina — 5. Majo 1931

Tunis — 15. Majo 1931

Napoli — 1. Junio 1931

Roma-Firenze — 10. Junio 1931

Venezia — 30. Junio 1931

Como-Lugano — 8. Julio 1931

Svislando — dum Julio 1931

Kraków — dum Aŭgusto 1931

Kompletan programon pri Eŭropo ni publikigos tuj, kiam tio estos ebla.

*Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado*

## POR LA GAZETARA PROPAGANDO!

Konsiderante la gravecon de la internacia gazetaro por nia propagando kaj por helpi sisteman kaj metodan organizon de tiu ĉi laboro per kunagado de fakuloj, I. C. K. aprobis la starigon de la

#### INTERNACIA GAZETARA KOMISIONO komisiita de I. C. K.

La komisiono konsistas el la jenaj ĵurnalistoj:

S-ro Georges Avril, Nice, *prezidanto*; s-ro Léon Agourtine, Paris, s-ro William Junes, Bedford, s-ro C. Schuhler, Saarbrücken, s-ro Jak. Šapiro, Bialystok, *komisionanoj*.

La komisiono laboras sur la sama bazo kiel la jam funkcianta komisiono por Radiostatistiko, sub la aŭspicio kaj laŭ direktivoj de I. C. K. kiel gvida centro de la E-movado.

La kunhelpo de libervolaj helpantoj, ankaŭ de ne-profesiaj ĵurnalistoj kaj samideanoj, havantaj rilatojn kun la gazetaro, estas tre dezirata.

Oni anoncu sin al: S-ro Georges Avril, redaktoro, Bd. Auguste Raynaud, Nice (Franco).

## BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

MALRIČA KNABO, KIU GLORIGIS. Verkita de Dr. Jan Herben. Ĝin eldonis la 7an de Marto 1930 *Moraviaj Esperanto Pioniroj*. Sur la dua paĝo oni legas la jenon: "Ĉi tiur libron ni eldonis okaze de la 80-a naskiĝtago de nia kara paĉjo dro T. S. Masarik, prezidanto de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Ĝin tradukis T. Mrázkova kaj B. Pittner.

LA MORTADO. Publika parolado eldirita en Wien la 25an de marto 1900 de Prof. D. Hermann Nothnagel. El germana lingvo tr

dukis Bernhard Selzer. Eldonita de *Esperanto Societo "Progreso"*. X., Ettenreichgasse 4/31. *Wien. Aŭstrujo*. Prezo: 1 germ. marko.

LA ETERNA EVANGELIO. Unua libreto. 2Sa broŝureto eldonita de H. J. Patiala. Sub tiu titolo aperos serio da libretoj, kiuj havas egalan formon kaj amplekson. Prezo: 0,40 sv. franko. Adreso: *H. J. Patiala, Turku, Aurakatu 14. Finnlando*.

LA PRINCO S-TA EMERIKO. Ilustrita broŝureto pri la vivo de tiu sanktulo el la gento de Sankta Stefano, kiu mortis en la jaro 1031. Verkita de D-ro Remigo Bodnár. Brd. Praem.

AMUZAJ RAKONTETOJ. Originale verkitaj de Pehef. Skribitaj en Esperanta Stenografio Duployé-Flageul. Eldonejo de Esperanta Stenografio: 9 *Bd. Voltaire. Issy-les Moulinaux. Seine. Francujo*. Ricevos senpagan lernolibron de esperanta stenografio ĉiu, kiu mendos tiun broŝuron al S-ro P. Flageul. Prezo: 1,50 fr. franko.

LA JUNULINO EL STORMYR. Verkita de Selma Lagerlöf, la plej fama sveda verkisto nuntempe vivanta, el kiu plumo fluis granda nombro da ĉarmoplenaj rakontoj, legendoj kaj romanoj kun simpla kaj poezio-plena stilo. Tiu ĉi verko estas sentoplena rakonto pri amo kaj pri malfeliĉo de juna, brava knabino. La personoj de la rakonto estas prenitaj el la kampara popolo sveda. Eldonita de "Eldona Societo Esperanto". *Stokholm, 1. Svedujo*. Prezo: Kr. 1.50.

"KAJ ĈIO RESTAS PENSO SED NE FARO". Pri interkompreno kaj homara frateco. De Laksmiswar Sinha. Honore dediĉita al S-ro Paul Nylén, laŭ kies instigo ĝi estas eldonita kaj al la anaro de nova epoko kiu laboras por krei humanan interkomprenon inter la homoj diversnaciaj. Eldonita de "Eldona Societo Esperanto." *Stockholm 1. Svedujo*. Prezo: 0,50 svedaj kronoj.

JARLIBRO de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio. 1930. Eldonita de Esperantista Akademio. *Esperantista Centra Librejo. 51, rue de Clichy. Paris. Francujo*. Prezo 2 frankoj.

OFICIALA BULTENO DE LA ESPERANTISTA AKADEMIO. Kajero III. Junio 1930. *Esperantista Centra Librejo. 51, rue de Clichy. Paris*. Prezo: 15 sv. fr.

ADRESLIBRO DE FILATELISTOJ. Jaro 1930. 32 paĝa, formato in 4-to. Ĝi estas

presita en lingvoj: pola, esperanta kaj germana kaj enhavas alfabeto laŭurbe ordigitan adresaron de aktivaj filatelistoj kaj filatelistaj entreprenoj. Eldonisto Wladyslaw Lekowsky, Piastow ad Warszawa, ul. Napoleonska, Pollando. Prezo: 2 germ. Markoj.

LA ELMONTRO DE LA SPIRITO. LA TALANTOJ. De Petro Danov. No dua de la dua serio de Biblioteko "Nova Kulturo", kiu havas la taskon doni al la esperantistaro la instruon de Majstro Danov en ĝia pura formo, eldonante liajn paroladojn. La unua serio, konsistanta el 10 numeroj, kostas 3 sv. fr., kaj la dua kiu entenas 14 prelegojn kostas 4 sv. fr. Mendu ilin al S-ro Atanas Nikolov, str. "Car Iv. Siŝman", *Burgas-Bulgarujo*.

RELIGIO FILOZOFIA VIVKONCEPTO DE PETRO DANOV. De A. Tomov. Aldono al Biblioteko "Nova Kulturo". *Burgas Bulgarujo*.

---

## ĈINUJO

Lasttempe ni ricevis la jenajn publikaĵojn:

THE CHINESE NATION. A weekly of important events relating to China. Issued by the *International Relations Committee*. No 5 *Mao-Tau street. Nanking. China*.

Le TRIPLE DÉMISME De Suen Wen, traduit annoté et apprécié par Pascal M. D'Elia S. J. *Bureau Sinologique Zi-Ka-Wie*.

THE CHINAISE NATION. A weekly periodical devoted to China's progress.

---

## LIVROS EM E SOBRE ESPERANTO

Peçam o novo catalogo de livros em e sobre Esperanto publicado pela "Papelaria Confiança" (*Rua Buenos Aires, 314 — Rio de Janeiro*).

O pagamento das encomendas deve ser feito adiantadamente, em vale postal ou carta registrada com valor declarado, dirigido ao *Dr. Carlos Domingues* ou ao *Sr. Edmundo Felix Tribouillet* (*Praça 15 de Novembro, 101. 2º andar — Rio de Janeiro*) ou aos *Srs. Alberto Silveiras & C.* (Papelaria Confiança).